

L A D E K A M E R O N O

=====

La pupteatra spektaklo por plenkreskuloj
laŭ "Il decamerone" de Giovanni Boccaccio

Adaptis: Henryk Cyganik

Esperantigis: Włodzimierz Wesolowski

/En teatra salonego la krepusko, de kiu estas aŭdebla mallaŭta mezepoka muziko. La fenestro de pupsceno vualita per ĉerizkolora kurteno. Sur la antaŭsceno granda taverna tablo el nerabotitaj tabuloj, longa masiva benko, sur kiu sidas Ĝiovano meditema ĉe vinkruĉo. En kandelingo flamantaj kandeloj, sur la teleroj kuŝas la fruktoj. Sur la benko apud Ĝiovano kuŝas malnova gitaro. Apude sidas Maria. Eklumiĝas buntaj reflektoroj./

Lodzo 1979

E N H A V O k a j P E R S O N O J

	Paĝo
Prologo	2
/Maria kaj Ĝiovano/	
Rakonto unua	3
/Andreuĉjo, Minetta, Maljunulino, Barnabo, Blato, Bertolo, Ĝakomo, Maseto/	
Rakonto dua /Tinego kaj edzino/	11
/Maria kaj Ĝiovano/	
Rakonto tria	13
/Ferondo, Abato, Emilia, Monako/	
Rakonto kvara /La unupieda gruo/	21
/Maria, Ĝiovano kaj tuta ensemblo/	
Rakonto kvina /Kalandrino graveda/	22
/Kalandrino, Bruno, Nelo, Bufalmako, Simono/	
Balado la ĉarmon de vino laŭdanta	26
/Maria kaj Ĝiovano/	
/ p a ŭ z o /	
Rakonto sesa /Balado pri la vosto/	28
/Maria, Ĝiovano kaj tuta ensemblo/	
Rakonto sepa /La diablo kaj infero/	29
/Alibeka, Rustiko/	
Rakonto oka /Amaventuro de Kalandrino/	33
/Kalandrino, Bruno, Nelo, Bufalmako, Nikolosa, Tesa/	
Rakonto naŭa /Lupo en ŝafstalo/	40
/Maria kaj Ĝiovano/	
Rakonto deka /Kalendaro de maljunaj edzoj/	41
/Rikardo, Bartolomea, Paganino/	

Balado pri forpasado * * 46
/Maria kaj Giovano kun ensemblo/

PROLOGO

/la balado de gvidpersonoj: M a r i a kaj Ĝ i o v a n o/

L a b a l a d o p r i a m a d o

Sensenca estus kvieto de l'arbaro,
Ĉiela bluo, aŭtuna la buntec',
se mi per buŝo ne povus vin karesi,
kun vi kuŝante sur muska elastec'.

Sensenca estus la kant' de l'najtingalo,
l'arĝentvualo de la lunluma mond',
se ne ekzistus la tremavida tuŝo,
vekanta ĝuon kun la volupta ond'.

Amu do min, amu do min - se nin ekregis amdeziro,
ne diru "ne", ne diru "ne" - ne lasu vivon vane kuri,
estu kun mi, estu kun mi - jam ne avaru korpmiraklojn,
jam estos vi ĉiel la "plej" - ne volu amon vi censuri.

Vi kaŭzas ĝojon, ĉielen vi min gvidas,
refreŝon verŝas dum la varmega tag',
ja kvankam jarojn la tempo fluetigas,
revokas vin al mi ĉiam la imag'.

En viaj haroj arĝente brilas prujno,
signiĝas tiel de tempo la sukces' -
kaj ĉu mi eblus, mem eklezianino,
al la homfrato do ne respondi "jes".

Amu do min...

Giovano: Honorindaj sinjorinoj, karaj fraŭlinoj kaj vi, estimplenaj sinjoroj -
la sciavido venigis vin, ĉu ne? Aŭ la mondfama verko de Ĝiovano Bocca-
ccio. Mi tamen kontentege vidas vin, gesinjoroj, en nia teatro.

Al sinjorinoj, do, mi mem donas la koron kaj dediĉas la saĝan enhavon
de dek rakontetoj, elektitaj de la cento. Ĉar kio povas esti pli valo-
ra, bela - ol fortika, riĉa, torenteca vivo?

Kion pli karan la naturpatrino povus doni al ni - viroj, penkurantaj

por la pano kaj tutplena monsako - ol ne ĉi kreitinojn, findonantajn al ni la volupton kaj malĝuon, ĝojon kaj sopiron, deziregon kaj abomenon, avidon kaj saĝigon.

Maria: Do, ankaŭ ol vi foriros de nia teatro en la urbon, por pasigi la nokton de amfuriozo - bonvolu aŭskulti kelkajn rakontetojn de "Dekamerono", kiujn majstro Ĝiovano al vi oferas...

Ĝiovano: Por fortikigi viajn animojn kaj intencojn...

Maria: Psst, Ĝiovano, jen venas Andreuĉjo di Pietro el Perugia. Ni lasu lin, kaj ni mem ĝuu la vinon kaj kareson.

/Ili sidiĝas kaj sur la scenejo aperas Andreuĉjo./

RAKONTO UNUA

Andreuĉjo /kantas/:

Mi, Andreuĉjo komercisto,
Napoli-n vidas do en fin',
kun plen monsako kaj sen tristo,
mi spertas tuj konkeri ĝin.
Ĉevalojn belajn mi aĉetos
kaj kun la bela junulin'
en ampasion tute ĵetos
por kelkaj ĉarmaj noktoj min.

Juneco pulsas en tempioj
kaj konu min de flanko ĉi
ke Andreuĉjo kiel dio
bon amorulo estas li.

Florenoj sonas en la poŝo -
kun help' de l'oro de akklam'
rifuzos kiu? - Andreuĉjo
ĝisfundos nokton de la am'.

/En scenejon venas Ninetta kaj Maljunulino/

Ninetta: Diru al mi, patrino, ĉu vi konas ĉi tiun junulon?

Maljunulino:

De suĉinfana aĝo mi lin konas. Li estas Andreuĉjo di Pietro el Peruggia, junulo ankoraŭ senzorga, tamen la bonega komercisto.

Ninetta: Prenu, patrino la kelkajn monerojn. Iru al ĉi tiu junulo kaj diru al li, ke li hodiaŭ vespere venu al Malpertuggio. Diru, ke atendas lin juna, estimata fraŭlino. Vi ricevos ankoraŭ la moneron, sed rakontu al mi ĉion pri tiu ĉi komercisto.

Maljun.: Ĉion mi faros, nur por ricevi ĝustan premion.

Ninetta: Jam iru patrino, mi atendas vin post nelonge.

/Ninetta foriras./

Maljun.: Mi konas ĉi tiun Ninettan, ŝtelistinon kaj fi-koketulinon, sed ĉu ĉi tio al mi malhelpas? La monon oni devas kolekti, ĉu ne? /Eniras Andreuĉjo/ Ho, sinjoro Andreuĉjo!

Andreuĉjo: De kie vi konas mian nomon, patrino?

Maljun.: Kiu povas ne koni tiel faman komerciston? Ĉiuj vin, sinjoro, konas en Napoli. Kaj ne unu junulino songas pri vi dum nokto. Precipe unu el ili bela kiel Madono.

Andreuĉjo: Diru al mi, kiu ŝi estas, ĉar forbruligas min scivolo.

Maljun.: Ŝi estas en tuta Napoli konata: gracia - kiel la cervino, varmega - kiel la fajro.

Andreuĉjo: Mi petegas, patrino, kiu ŝi estas?

Maljun.: Eĉ pli multe mi diros, junulo. Mi povas vin enkonduki ŝian hejmen, ĉar mi konas ŝian grandan fajron de avido al vi, sed...

Andreuĉjo: Kial "sed", maljunulino?

Maljun.: La komercisto vi estas, ĉu ne?

Andreuĉjo: Ho, saĝa kaj ruza vi estas. Prenu florenon, nur tuj kaŭzu, ke mi ankoraŭ dum krepusko estu enkondukata en hejmon de la fraŭlino.

Maljun.: Tre malavara vi estas, sinjoro. Via servistino mi estas. Do, mi diros al vi: venu hodiaŭ post la sunsubiro al Malpertuggio, demandu pri Ninetta, la filino de Rolando di Nicoli...

Andreuĉjo: Di Nicoli - vi diras. Antaŭsciigu la fraŭlinon, ke ŝia gasto hodiaŭ mi deziras esti. Rapidu, maljunulino.

/Maljunulino foriras./

Andreuĉjo /kantas/:

La noktalven' min ekscitegas
per voluptaj pensoj.

Mi kredas jam, ke vi posedas
povon super miaj sensoj.

La noktalven', de vi avido
senriproĉe vokas...

noktpapili' same kun fido
en la flamo sin sufokas.

/Andreuĉjo frapas la pordon per la mano./

Ninetta: Malfermite!

/Eniras Andreuĉjo, Ninetta fervore ĉirkaŭprenas lian kolon
kaj kisas lin./

Estu bonvenita en mia hejmo, karegulo. Tiom longe mi atendis vin,
tiel mi deziris vidi vin. Estu en mia hejmo, sentante vin kiel en
la propra. Kaj ne miru pri miaj larmoj. Ili estas larmoj de la feli-
ĉo. Mia frato...!

Andreuĉjo: Vere, mi ne konjektas, kial vi, bela fraŭlino...

Ninetta: Eksilentu, karulo, ĉar la komplikon de sorto vi ne konas. Bonvolu diri,
ĉu la onklino Bianka estas sana.

Andreuĉjo: Jes, ŝi estas sana, dank' al Dio. Diru tamen, de kie vi konas la on-
klinon Biankan?

Ninetta: Ho, mi kompatinda, malfeliĉa via fratino...

Andreuĉjo: Nenion de tio ĉi mi komprenas.

Ninetta: Tuj vi finkomprenos, se mi diros, ke mi estas via fratino. Mi regalos
vin per luksa manĝaĵo kaj per vino ankaŭ.

/Si plenigas la pokalojn./

Sciu, ke via patro, Pietro di Perugia, kiel komercisto dum kelkaj monatoj restadis en Sicilia kaj tiam mia patrino - vidvino - al li ekardis per granda afekcio. De tiu ĉi afekcio estas naskita mi - via fratino. Drinku, frato... Sufiĉe longe nia patro restadis en Palermo, sed iutage pro la ordono de reĝo Karlo devis lasi ĉi urbon.

Andreuĉjo: Fakte, la fratino, ĉio estas la vero...

Ninetta: Kial ĝi ne povus esti la vero, se mi bonege konas la historion de nia familio.

Andreuĉjo: Enverŝu al mi vinon, fratino. Vere, miraklo grandega, ke mi vin renkontis. Permesu, ke mi kisu vin kaj brakumu! /Li brakumas Ninettan, jam kormoligita pere de la vino/ Vere la miraklo... fratino mia...

Ninetta: Ĉu ankoraŭ la vinon, Andreuĉjo?

Andreuĉjo: Jes, fratino, ankoraŭ la vinon. Diru nur al mi, kie estas tiu ĉi ejo, en kiun eĉ la reĝo necesas piediri.

Ninetta: Jen pordo al ĝi. Tamen senvestiĝu antaŭe, Andreuĉjo, ĉar ja dum nokto vi ne foriros al gastejo, sed ĉe via fratino restados.

Andreuĉjo: Dankon al vi, fratino, pro la gastameco... /Li senvestiĝas/ Mi tre ĝojas, ke mi ekkonis vin, sinjorino... la vino iom malklarigis mian kapon... do mi opinias, ke pro la familiaj ligoj, vi permesos al mi ĝui la sorĉojn de via korpo.

Ninetta: Ho, Andreuĉjo, vi estas same belstatura kaj ampotenca kiel via patro. Rapidu kaj mi sternos la liton...

Andreuĉjo: /irante al montrita pordo/ Restu nur por kelkaj minutoj sola, mia fratino... /Li malfermas la pordon kaj falas en abismon./ Helpu! Hel...!

Ninetta: Adiaŭ, juna komercisto! Paco kun vi.

/ŝi iras al la vesto de Andreuĉjo, eligas monsaketon./

La florenojn vi jam ne bezonos kaj por mi ili vere estos bona almozo de via stulteco. /Ŝi kalkulas la monon. La dekoracio turniĝas./ Viajn ĉevalojn mi ŝanĝos kontraŭ belaj vestoj, rozoleoj, la amon de belegaj viroj mi kontraŭ ili aĉetos. Ho, florenoj de la stultulo... la saĝaj florenoj...

/En scenejo fasado de loĝdomo, desube pengrimpas Andreuĉjo malseka de la kanalaj malpurajtoj./

Andreuĉjo: Ho, hoo! Malfermu Ninetta! /li frapas la pordon/ Okazis malfeliĉo!
Malfermu! Estas mi, via frato Andreuĉjo! /frapas la pordon denove/

Urbanino: /el la fenestro/ Kiu bruas dum nokto? Kial vi kriegas, junulo, kiam
la tuta urbo dormas?

Andreuĉjo: Mi estas Andreuĉjo el Perugia, la frato de fraŭlino Ninetta, kiu
loĝas en ĉi tiu domo. Okazis al mi la ĉagrena aventuro...

Urbanino: Mi flaras vian aventuron. Sed foriĝu de ĉi tie kaj ne mensogu. Neniu
Ninetta loĝas ĉi tie. Mi klare diris, foriĝu de ĉi tie aŭ mi vokos
la urbajn gardistojn. /ŝi fermas la fenestron/

Andreuĉjo: Ho, Dio, ĝuste vi min punis pro mia naiveco kaj stulteco, ja estas
la vero, ke dum unu nokto mi perdis kvincent florenojn kaj la frati-
non. Kiel nun mi revenos al Perugia, kiel mi redonos la monpruntan.
Dio mia... Tsss... Iu venas...

/Li kaŝas sin en la murfaldon, en scenon kaŝe iras du noktaj
rabistoj: Barnabo kaj Blato./

Barnabo: Kaj mi diras al vi, Blato, ke estas al ni bezona ankoraŭ la tria.
Ni ne sukcesos duope.

Blato: Kie ni serĉu la trian. En la urbo gardistoj ofte patrolas. Episkopo
Filipo Minutolo hodiaŭ estis entombigita. Ĉu vi pensas, ke monaketoj
estas tute stultaj? Ke ili donacos al la episkopo la oran fingrorin-
gon kun rubeno?

Barnabo: Sed kial ĝuste hodiaŭ? La kadavro ankoraŭ varma...

Blato: Ne babilu, Barnabo, ĉar stulte vi parolas...

Barnabo: Ĉu vi flaras? Nu, tiru la aeron, Blato!

Blato: Ho, diablo, kia fetoro.

Barnabo: Certe de la kanaloj.

Blato: De la kanaloj? /li rimarkas Andreuĉjon/ Kaj eble de tiu rato. Vi!
Kiu vi estas?

Andreuĉjo: /terurigita/ Mi... mi... estimindaj sinjoroj...

Barnabo: Ha, ha, ha... estimindaj sinjoroj... Neniu ĝis nun tiel paroli al ni.

Andreuĉjo: Mi devenas el Perugia. Mi intencis aĉeti en Napoli ĉevalojn, sed putinojn oni deziris al mi. Kaj en tiu ĉi domo unu tia Minetta rabis de mi kvincent florenojn kaj ankoraŭ inside kaŭzis mian tiun ĉi staton.

Blato: Barnabo, ni havas kunulon.

Barnabo: Kun tiu ĉi odoreto? Eĉ la episkopon li pretas vekti de la morta dormo.

Blato: Ni lavigos lin. He, Andreuĉjo... Ĉu vi vidas tie la puton?

Andreuĉjo: Jes, sinjoro...

Blato: Kaptu la ŝnuron kaj malleviĝu en la puton. Lavu vin skrupule kaj poste vi iros kun ni.

Andreuĉjo: Kien mi devos iri?

Blato: Barnabo, ĉu li ne volas tro multe scii?

Barnabo: Same mi opinias...

Andreuĉjo: Ne, ne, sinjoroj... Laŭ via deziro mi jam rapidas laviĝi. /Li proksimiĝas al la puto kaj malaperas en ĝi. Barnabo kaj Blato tenas la ŝnuron/

Barnabo: Ĉu ni dispartigos la rabaĵon ankaŭ por li?

Blato: Ĉu vi tute stultiĝis?

Barnabo: Mi nur demandis. He, perugiano, laviĝu rapide.

Andreuĉjo: /el puta profundo/ Mi estas preta, tiru la ŝnuron!

/Dum sceno apud puto dekoracio turniĝas: preĝeja vestiblo, unuavice tomba monumento de Filippo Minutoli./

Barnabo: Ni meritis ĉielon per bona ago, foriginte de li la retoron. Ĉu vi estos dankema al ni?

Andreuĉjo: /grimante el la puto/ Jes, sinjoro, dankon.

Blato: Ni ne havas tempon por perdi. Ni iru.

Andreuĉjo: Mi vere ne povas scii kien?

Blato: Al la varma episkopa kadavro.

Andreuĉjo: Kiel oni povas tion kompreni?

Blato: Simple. Hieraŭ mortis episkopo Filippo Minutoli, kaj por la eterna vojo oni metis en lian fingron la oran ringon kun rubeno, por ke li povu digne prezentiĝi antaŭ Dio. Certe li jam prezentiĝis kaj la ringon plu ne bezonas. Sed por ni ĝi estas bezona, ĉu ne, Barnabó? He, he...

Barnabo: He, he, ni ĝin bezonas, Blato.

Blato: Psst... Ni jam estas en preĝeja vestiblo. Ĝi estas la episkoptombo?

Barnabo: Sendube.

Blato: Kiu el ni malsupreniros?

Barnabo: Mi ne iros. Andreuĉjo povas...

Andreuĉjo: Mi ankaŭ ne kontraŭ io ajn en la mondo. Mi mortus pro la timego.

Blato: Barnabo ne iros. Mi ankaŭ ne. Do malgraŭ ĉio al vi, Andreuĉjo, apartenos tiu honoro. Kaj se vi rifuzos tiun honoron, ni frapos vian kapaĉon per tiu ĉi feraĵo tiel efike, ke vi baldaŭ elspiros vian spiriton. Tamen enirante la tombon vi havas ŝancon savi vin, ĉar episkopo povas ne vekigi...

Barnabo: Do ne prokrastu, ĉar elektopovon vi havas malgrandan. Nu, ni levu la tombplaton... /kune kun Blato ili levas la tombplaton, ĝemante pro la penego, Andreuĉjo tremante pro la timego eniras la tombon/

Blato: Nu, descendu!

Barnabo: Ĉu vi jam trovis?

Andreuĉjo: /el la tombo/ Jes. Li estis sufiĉe dikstatura...

Barnabo: Mi ne demandis pri la episkopo. Ĉu ringon vi jam havas?

Andreuĉjo: Mi ankoraŭ ĝin serĉas. Mallume estas ĉi tie kaj escepte malvarme. Kaj laodoro ankaŭ ne estas agrabla.

Barnabo: Ne estas stulta ĉi tiu komercisto. Priŝakri nin li volas. Eble ni promesu al li la parton de rabaĵo.

Blato: Rezultas, ke...

Barnabo: Psst... Aúdu!

Blato: Diablo iun alportas.

Barnabo: Certe monaketoj la saman ideon realigas.

Blato: La diabla ludo. Ni forkuru!

Barnabo: Kaj li?

Blato: Li? Al la dia protekto li sin rekomendu. Ni forkuru! /La plato falas kun bruo, la rabistoj forkuras. Pormomenta silanto. De la kontraúa flanko venas pastro Bertoli kun du aliaj monakoj, ili moviĝas singarde, la unua portas flamantan kandelon./

Bertolo: Ĉu vi aúdis? Iu estis ĉi tie. Aú li ankoraú ĉi tie estas.

Maseto: Mi timas, patro. Eble diabloj kun la episkopo petolas?

Bertolo: Stultulo vi estas. Lumigu. La tomboplato knalfermita. Certe nur oni kimeris al ni.

Ĝakomo: Tamen mi aúdis precize... Mi timas!

Bertolo: Se vi ne ĉesos tremi, mi ĵuras, ke mi vin anatemos.

Maseto: Tamen, la pastra moŝto, mia aúdkapablo estas sufiĉe bona kaj...

Bertolo: Bridu vian langon, Maseto. Ni ne havas tempon. Baldaú tagiĝos. Eĉ se iu estus ĉi tie, povis esti napoliaj rabistoj, kiujn ni terurigis. Kaj ni havas neniun kaúzon por timi. Ja ni estas ĉe ni. Nun ni levu la tomboplaton kaj submetu la apogilojn. Nu, rapidu, fratetoj... /pene ili levas la tomboplaton kaj submetas la apogilon/

Bertolo: Eniru, Ĝakomo.

Ĝakomo: Ne, eĉ kontraú ĉiuj mondtrezoroj.

Bertolo: Kial vi timas? Ĉu vi pensas, ke vin la mortinto mordos? La kadavroj ne manĝas la homojn. Pruvu al li, Maseto.

Maseto: La pastra moŝto, eĉ se mi estus torturota, mi ankaú tien ne irus.

Bertolo: Stultuloj! Mi eniros mem. /li ŝoviĝas en la fendon kaj Andreuĉjo kaptinte lin entiras internen - Bertolo kriegas akute, liaj du helpantoj forkuras panike/ Helpon! Savu la Dio! Episkopo...

Andreuĉjo: /grimpane el la tombo/ Kaj nun estiminda pastro, dank al via helpo en ĉagrenoj - mi fermigos vin kune kun la episkopo. /li forigas la apogilon kaj tombo knalfermiĝas/ Tia ringo valoras eĉ pli multe ol kvincent florencoj. Adiaŭ, Napoli, mi lernis ĉi tie iom, dankon pro tio...

/La kurteno kunŝoviĝas./

Giovano: Mi rakontis al vi iom skandalan historion, tamen en ĝi la moralajon oni povas trovi facile. Kiel vi opinias, Maria?

Maria: Mi tamen estas konvinkita, ke la natura amo, eĉ kun neĉastulino kondamnita ne povas esti.

Giovano: Ĝustege vi diris, tial mi - ja vi min konas - ne imitas mian amikon Petrarkan kaj ne sopirĝemas al ŝi, kiel li al Laura, sed prenas de vi tion, kion vi volonte donadas, kaj kio: mi konas min - la viro, kaj vin - la virino faras. Kaj fadenon de la rakonto plu ŝpinante, ni oferas al vi historion pri tinego kaj edzino.

Balado pri tinego kaj edzino

/laŭ novelo "Tinego kaj edzino"/

Karaj al ni aŭskultantoj,
trointeres' pri guldenoj
faros vin orposedantoj,
sed portas ankaŭ ĉagrenojn.
Avorianon zorgulon
ni montru la masoniston,
kiu tagiĝe kun trulo
hejmon restadis sen tristo.
L' edzo la monon gajnadis,
hejme l' edzin' unusola
nur fidelecon ŝajnadis,
estis ja febla kaj mola.

Prenis ŝi junan Ĝanelon
por ĉiutagaj amservoj,
bone ŝi trafis la celon,
jam ne necesis rezervoj.
Sed iutage dumfeste
la masonisto misita
iris for hejmo modeste,
tuj venis - pordo ŝlosita.
Pene mildante anhelon
terurigita l' edzino
entinegigas Ĝanelon
kaj lasas l' edzon hejmsinen.

Ŝi eklamentas: - "Ni prenos
de kie monon por boni,
se vi tagmeze revenos
nokte anstat' finmasoni."

- "Gajnos mi kvin orflorenojn
kontraŭ tineg' malutila,
do edzin' lasu ĉagrenojn,
ĉar aĉetant' venas brila."

Rompas la diron l' edzino:

- "Malmultekosta komerco!

Kun la brilul' via fino,
lia propon' estas ŝerco.

Ĉe ni jam estas bonulo,
kiu - kondiĉe purigo
en ĉiu intern angulo -

sep orflorenojn pretigos."

La masonisto kontenta
tuj al laboro pretiĝis,
per la spatelo ĉarpenta
kontraŭ malpuro turniĝis.

Per la kandel' lumigante
ŝi ĉiam urĝis la edzon,
ĝuis samtempe sentante
en si dolĉegan tardecon.

Dolĉa Ĝanelo brutalo
situacion eluzis,
kiel la ard virĉevalo
ekster tineg' ŝin amuzis.

Kiam finbridis sangpremojn,
ĵus la tineg' estis pura,
donis li sep orflorenojn
kaj adiaŭis plezure.

La karaj do aŭskultantoj,
trointeres' pri florenoj
faros vin orposedantoj,
sed portas ankaŭ ĉagrenojn.

Giovano: Tamen la masonisto ĉagrenojn ne havis. Li ne perdis sian edzinon.

Maria: Ĉu vere?

Giovano: Ĝanelo ne kaŭzis iun mankon de ŝi, kaj verdire ĉiuj estis tre kontentaj pro la okazintaĵo.

Maria: Sed tamen la edzino de masonisto sian korpon al la alia donadis.

Giovano: Kial malutila ĝi restu? La masonisto malpli zorgis pri ĝi ol pri la florenoj, kaj korpo la juna, varmega.

Maria: Trankviliĝu, Giovano, ĉar vi kverelon kaŭzos. Vi konas tamen proverbon, ke se la okuloj ne vidas, la koro ne ĝemas. Do mi avertas: se mi vivas kun vi kaj ekscius pri via trointereso pri alia virino - la okulojn de ŝi mi elgratus kaj vian dignan petolilon per razilo mi fortranĉus!

Giovano: Maria, mi ne sciis...

Maria: Vi ne sciis, vi ne sciis...

Giovano: Nun mi komprenas. Kaj alian dignan virinon kun edzo pri mono avidanta mi prezentos. He, Ferondo!

/En la fenestro de pupsceno aperas Ferondo, dika avarulo kaj krudulo./

Ferondo: Ĉu vi min vokis, sinjoro?

Giovano: Jes, Ferondo, mi vin vokis por ekscii, kiel geedza lito al vi servas.

Ferondo: Ne al mi geedzalito, sinjoro. La edzinon en ĝi mi tenas kaj mi devas gardi la bienon. Nieniel oni povas edziĝi al bieno, do ĉiam necesas pri ĝi konkuri. /li kantas/

El Toskanio Ferondo
ventr' mian dignon atestas
kaj societ' de la mondo
de l' oro suneska.

Mia fidela edzino
hejme mastrumu tardplande --
mi pro saĝeco sen fino
ekregos la landon.

/Ferondo paŝas komike, digne, glatumas la ventron. En la monakeja pordego aperas Abato. Li kantas./

Abato: Mizer edzin' de stulta Ferondo,
malofte ŝin li kontentigas,
mi devas prove sendi la sondon,
virinojn ja mi adoregas.

Kvankam mi estas linda l' abato,
sendube la Dio dezirus
grundojn kulturi de noval stato,
anstataŭ fidel' l' amon admirus.

Pri kio vi tiom pensegas, Ferondo?

Ferondo: Bonvenon, abata moŝto. Mi pensas pri... pri la savo de animo.

Abato: /flanke/ Li mensogas, vere, ĉar krom propra profito li ne scipovas
pensi pri io alia. /al Ferondo/ Sed ĉu difilino kaj via edzino portas^{jam}
en sia pubo idon vian?

Ferondo: Patro abato, kiel mi pensu pri maldecaĵo, kiu ja estas porida agado,
se mi enprofundiĝas kontempladon pri la savo de animo?

Abato: Tamen pro la devo de Dio fiksita...

Ferondo: Mi konas ĉi devon. Sed kontempladon pri la eterna feliĉo mi opinias
principe antaŭ tiu devo.

Abato: Treege pia animo via estas, frato Ferondo. Notita estos tio en ĉielo, sed nun voku al mi vian edzinon, por ke mi povu instrui ŝin pri la geedza fidelo.

Ferondo: Ja mi albridis ŝin, patro abato, tamen instruu ŝin precizege, eĉ se restus en stoko, ĉar ŝi estas nur pekema virino... /foriras/

Abato: Vere, ke per granda inklino al tuta inaro mi pekas, kaj ankaŭ vere, ke mi enamiĝis al Emilia, la edzino de Ferondo. Pardonu al mi, Dio... Sed ankaŭ stultulo kaj krudulo, posedante tian belegan trezoron, scias esti ruza kaj sagaca en ĝia gardado. Sed rezigni pri realigo de mia avido mi ne povas... Psst... la objekto de mia volupto alvenas... /alproksimiĝas modesta Emilia/

Ĉiu sekvonta tago pli melankolia vi estas, filino mia. Diru, kia estas la kaŭzo de la melankolio. Dio aŭskultos vin favore...

Emilia: Estimata patro! Se Dio donacus al mi la veran edzon, aŭ sen edzo min restigus, vere facile estus pie konduiti. Tamen konsiderinte, kia estas mia Ferondo, kiel granda estas lia stulteco, mi povas senti min la vidvino. Eĉ plu, havante obtuzan virecon, sen iu kaŭzo li estas furioze pri mi ĵaluza, mi do vivas en senĉesa turmento. Konsiludo, estimata patro, kion mi faru, ĉar kontraŭe ĉiu konfeso kaj instruo senutilaj restos...

Abato: Filino mia, mi facile komprenas, ke malagrabra estas vivo de tiel belega kaj subtila virino, kiel vi, kun la malsaĝulo kaj ĵaluzulo. Mi ne vidas alian rimedon, ol Ferondon dekutimigi de ĵaluzo.

Emilia: Sed kiamaniere?

Abato: Ĝustan kaj efikan medikamenton por li mi povas prepari. Mi petas nur, ke vi miajn vortojn kaj intencon detenu en sekreto.

Emilia: Prefere mi mortos, ol ripetos al iu viajn vortojn.

Abato: Por Ferondo resaniĝu, li devas resti portempe en la purgatorio.

Emilia: Ĉu li povas vive tie troviĝi?

Abato: Oni devas, ke li antaŭe mortu. Poste li suferos tiom da doloro tie, ke li dekutimiĝos de ĵaluzo. Ni tamen ambaŭ petos Dion per specifaj preĝoj, por ke li Ferondon revivigu.

- Emilia: Do mi vivu en vidva stato?
- Abato: Dum iu tempo nur. Sed edziniĝi tiam vi denove ne povas.
- Emilia: Ĉion mi estas preta fari por Ferondo seniĝu de tiu aĉa eco.
- Abato: Kaj kiun rekompencan mi ricevos pro realigo de mia intenco?
- Emilia: Postulu kion vi deziras, ĉion mi pretas fari.
- Abato: Donu do al mi vian amon kaj korpon vian, ĉar mi ardas de la avideco, kaj flamo tiu neestingebla estas.
- Emilia: Kion mi aŭdas, estimata patro? Ĉu indas la piaj viroj postuli tion de virinoj, konsilon petantaj!?
- Abato: Tio, kion postulas mi, filino, peko estas de korpo, ne de spirito via. Kaj al spirito ĝi nenon damaĝas. Mi eĉ pli diros - vi povas fieri de via gracio, ĉar plaĉas ĝi al sanktuloj, al kutimiĝintaj al admirado de ĉielaj mirakloj, kaj min, homon pian, en amon al vi igas. Ĉar ĝi kaŭzas mian grandan de vi avidecon. Mi kredas, ke ne tro malfacile vi realigos mian postulon, kontraŭe, deziru tutanime tion, kion mi deziras. Krome, mi havas sufiĉe da belegaj kaj altprezaj juveloj, kiujn mi jam delonge por vi destinis.
- Emilia: Laŭ via volo fariĝu, sed tiam nur, kiam Ferondo al la purgatorio foriros...
- Abato: Sendube mi tion faros. Klopodu nur, mia filino, ke li baldaŭ min vizitu.
- Emilia: Laŭ via volo... patro... /ŝi foriras/
- Abato: /kantas/
De orientaj saĝuloj Ferondo, venu, atendas
pulvoron sorĉan mi havas, purgatorio abrupte,
per kiu hom mizerulojn mi Emilian distregos
portempe dormo mortlavas. kaj ŝin ĝisfundos volupte.

Pardonu, Dio. Sciu tamen, ke al via laŭdo mi tion faros, kvankam mi faros volonte... /venas Ferondo/ Bonvenu, kara Ferondo. Bona estas kontemplacio, tamen de tempo al tempo pri bona vino oni ne povas forgesi. Venu, fratetoj, portu la kruĉojn kun vino kaj amikon

nian Ferondon kore gastigu.

/Antaŭ la monakeja pordego aperas tri monakoj, portantaj la kruĉojn, al unu ele la kruĉoj Abato enŝutas iom da pulvoro. Muta sceno, komentata de Ĝiovano. La fratetoj drinkas la vinon, babilas... Tuj Ferondo falas, granda movo, elsvenigado... senrezulte. Alvenas Emilia. Funebraj sonoriloj sonoras de malproksime. La korpo de Ferondo estas kuŝigata en la monakeja tombokelo./

Ĝiovano: Ekkonu, estimataj spektatoroj, sagacon de la Abato kaj ankaŭ la forton de lia amo. Jen Ferondo la vinon kun sorĉa pulvoro eltrinkas, ankoraŭ li diskutas, sed jam eksentas iun malforton de la korpo. La monakoj nenion sciante mokas la kompatindulon, kiu balancas sur la piedoj. Ĉu iu stomaka disagordo, ĉu aliaj korpsuferoj? Sed la akvo ne helpas, la pulso malfortiĝas, certe Ferondo elspiris la spiriton. La alvokita edzino Emilia vidvinajn larmojn jam verŝas, la vestojn disŝiras.

Emilia: Aaa, aaa...

Ĝiovano: Tamen nenion oni povas ŝanĝi. La monakejaj sonoriloj la morton de Ferondo ĝeme atestas. Kaj la korpo de mizerulo en monakeja tombo estas sepultota.

/Abato restas sur sceno kun ununura konfida monako./

Abato: /flanke/ La purgatorio por Ferondo destinita kaj por mi lia geedza lito kun belega Emilia. /al monako/ He, monako mia konfida!

Monako: Kion vi diras, patro abato?

Abato: Ni agu laŭ nia interkonsento. Prenu lin je la piedoj.

Monako: /li kaptas la piedoj de Abato/ A, je la piedoj...

Abato: Sed ne min! Kaj mi tenos liajn brakojn.

Monako: /li kaptas Abaton sub la akseloj/ A, la brakojn...

Abato: Sed ne min. La pekulon! Kaj ni mallevu lin en la monakejan tombokelon. Do li restadu tie en la purgatoria malhelo. Kaj vi ne kompatu lin, monako...

/la lumo en la fenestro de pupsceno estingas, Ĝiovano kantas/

Ĉiam stulteco perdas la decon,
kvankam sen plena konscio,
dignon ŝajnigas, kaj ĝin perdigas
por homamasa laŭdkrio.

Estas hazarde: sort' mokas tarde
stultan malriĉan senforton.

Ho, indulgema sed ne blasfema
devas ja esti la sorto.

Lasis Ferondo ĉi tiun mondon,
al providenc' inon cedis,
kredis li forte, ŝi lin ĝismorte
amos, sed vane li kredis.

Kiu do kaŭzas, ke sort' ne paŭzas
semi stultecajn deviojn,
tamen stulteco perdas la decon
ĉiam sen plena konscio.

/li parolas/ Honorindaj sinjorinoj, kiuj regantinoj de koro mia
restadas, aŭskultu la purgatoriajn aventurojn de Ferondo, por
edzoj viaj antaŭaverton.

/Sur la sceno du partoj. Unua - la purgatoria: en la kelo kuŝas Ferondo,
pri kiu zorgas Monako; dua - la lita: Abato kun Emilia "priploras" la
vidvecon de la lasta./

Ferondo: /en kelo malluma, apude Monako kun vergoj en mano/ Kie mi estas?
Dio, kie mi... /ĉimomente lin surprizas la vipado per la vergoj de
Monako/

Monako: Ne voku la dian nomon ŝerce. En la purgatorio Dio ne kutimas
esti, animo peka.

Ferondo: Do mi estas en purgatorio?

Monako: Dio ekkompatis kaj vi ne estas en la infero.

Ferondo: Do mi mortis?

Monako: Per tute natura morto.

Ferondo: Ho, Dio, mi orfigis mian edzinon! Sendube ŝi denove edziniĝos kaj kaj forgesos pri sia karulo. Ho, sorto mia, purgatoria!

Monako: Ne blasfemu! /li vergbatas Ferondon/ Ĝoju pro tio, kion vi havas. Kaj via edzino eble finstultiĝis, se al simila al vi krudulo panon kaj vinon alportis. Pro ĉiuj viaj ofendoj kontraŭ ŝiaj honoro kaj virineco. Prenu, manĝu kaj trinku, pekulo!

Ferondo: Kiel? Ĉu la mortintoj manĝas?

Monako: Se ili estas malsataj - manĝas. Se ili ne volas - mi forprenas...

Ferondo: Ho, ne, ne, mia kara gardaĝelo... /li trinkas la vinon/ La edzino ĝin alportis?

Monako: Ŝi donis por la sankta meso el nia monakejo kaj la Dio-Sinjoro permesis ke oni alportu al vi la vinon.

Ferondo: Do ĉi tiu megero jam ne povis doni por du mesoj, por ke la vino estu pli bona?

Monako: Vi malhumila fripono! /li vergbatas Ferondon/ Danku al la ĉielo pro favoro!

Ferondo: Anĝelo, jam sufiĉas! Mi petegas! Ho Dio, kiuj turmentojn mi suferas...

Monako: Vi ne scias pro kio? Mi aldonos...

Ferondo: Mi scias, mi jam multe scias, kvankam supoze ne ĉion, sed certe mi ĉion ekscios. Vi nur min ne turmentu jam...

/La dua parto de sceno: Abato kun Emilia en la lito. La sceno erotika./

Emilia: Viaj juveloj, estimata patro...

Abato: Silentu, fratino, ne fortimigu la volupton.

Emilia: Sed mi jam delonge ne ĝuis tiel dignan amoradon.

Abato: Ĉar tiu amoro de Dio al vi donacita. Do nenion al mi avaru, fratino, kaj ankoraŭ multfoje permesu enprofundi la volupton, kiu eĉ sanktan Franciskon certe ekstazigus.

Emilia: Do prenu, estimata patro, kiomfoje la animo deziros. La vidvino - mi,

sed la virino ankaŭ antaŭ ĉio... Ho, vi estas la anĝelo por mi...
revelacio...

/La kela parto. Denove batita Ferondo./

Ferondo: Ĉu vi povas diri al mi, pro kio vi tiel kruale punas min? Mi jam
ne povas kalkuli la tagojn, kaj la frapojn falantajn ĉiutage sur
mian dorson.

Monako: Mi faras tion pro la dia ordono. Kaj vi estos batata senfine pro
tio, ke vi estis ĵaluzulo, havante la edzinon - estantan la plej
bona virino en la mondo.

Ferondo: Vi diris veron, anĝelo. Ve, ve al mi! Sed mi ja ne sciis, ke Dio
la ĵaluzajn edzojn toleri ne povas.

Monako: Vere, tro malfrua bedaŭro. Sed se vi, perfidulo, iam ajn en la teron
revenos, gardu vin kontraŭ ĵaluzo kiel kontraŭ la fajro.

Ferondo: Ĉu mortintoj povas reviviĝi?

Monako: Se tia estas la dia volo.

Ferondo: Ho, estu la tia... Dio, mi neniam batos edzinon mian, nek profanos
per malbona vorto. Mi estos la plej sentema kaj digna edzo!

Monako: Ho, fi! Ho, fi!

/La lita parto - kiel antaŭe./

Emilia: Mi ne scias - eble mi eraras - estimata patro, sed la tria monato
jam pasis de foriro de mia edzo en la purgatorion. Kaj mi en ventro
mia antaŭ nelonge eksentis la novan vivon, alvokitan pere de juveloj
viaj...

Abato: Ne povas esti...

Emilia: Ne ĉagrenu. Se Ferondo el la purgatorio reviviĝos... Amoru min,
patro, ĝis kiam mia ventro - pro suktoj viaj - ne pligrandiĝis. Amoru...

Abato: Nur unufoje ankoraŭ mi hodiaŭ vin enprofundigos, kaj poste mi devas
kuri en monakejon kaj Dion preĝpeti, po ke li Ferondon de la pur-
gatorio liberiĝu. Certe Dio plenumos preĝpetojn miajn kaj baldaŭ
vi povos ĝoji pri lia reveno.

Emilia: Kiel do? Kaj vi, patro abato?

Abato: Eble, pri mi vi ankaŭ plu ĝojos. Kiel mi eblus, fratino, senkonsole vin restigi. La purgatorio certe ŝanĝis la karakteron de via Ferondo, sed la naturo forton al li ne povas redoni.

Emilia: Se vi estos... Ho, jes...

/La kela parto. Monako tiras el la kelo dormantan Ferondon, kuŝigas lin en la tombon kaj travestiĝas en ĉiutaga vesto./

Abato: /enirante/ Mona... monako! Ho, monako, kiel fartas nia purgatoria animo?

Monako: /grimpane el la tombo/ Ĝi jam travestita atendas la vekigon.

Abato: Dank' al Dio, kaj ankoraŭ pli multa danko, se li pri nenio ekscios kaj mian infanon kiel la sian agnoskos...

Monako: Kion vi diras, patro abato?

Abato: Ho, nenion... La brevieron mi estis ripetanta.

Ferondo: /el malsupre de plato de tombo/ Apertu, por Dio, apertu!

Monako: Li vekigis.

Abato: Li revivigis el la purgatorio.

Monako: Jes, patro abato, estas kiel vi diris.

Abato: Malfermu! /Monako apertas, el la tombo grimpas Ferondo, li genuiĝas antaŭ Abato/

Ferondo: Mi ĵuras, estimata patro...

/La lumoj en la fenestro de pupsceno estingas./

Giovano: Kaj estis laŭ la ĵuro. Ferondo ĉesis ĵaluzi pro sia edzino, amis kaj estimis ŝin, kaj la abato - kiel estis antaŭe - de tempo al tempo kun Emilia siajn juvelojn dividadis, kiel la amo al kunestulo ordonas. Maria, ĉu vi dormetas?

Maria: Ne, mi aŭskultas vian rakonton, Giovano.

Giovan8: Kaj kiel ĝi plaĉas al vi?

Maria: Kiel ĉio, kion vi faras, Giovan8.

Giovan8: Por niaj spektatoroj ripozu de la teatro - ni rimarku, ke nur por momento - alian historion per la kanto ni mem rakontu.

/La balado de Maria kaj Giovan8/

Balado pri unupieda gruo

/laŭ novelo "La unupieda gruo"/

En urbo ĉi loĝis iam
Kurado Gianfigliazzi,
virinojn, vinon amis li ĉiam,
gustante rave ŝmacis.

Per mango bona kaj brando
regalis la amikojn,
ĉasadi ofte petis la bandon,
amantojn de kalikoj.

Li havis la kuiriston
/Kikibjo nomo lia/,
ravantan arde pri l'amasisto
ĉe ĉarm Brunetta ia.

Kikibjo rostis la rava
por luksa vespermango
ĉasitan grumon de falko brava
dum lasta ĉasaramango.

Aroma kiamodoro
en kuirej' flareblis,
- "Femuron donu al mi favore" -
Brunetta petaŭdeblis.

Rifuzi li ne povis
pli grandan eĉ detruon
kaj dum regalo gastoj do trovis
rostitan kriplan grumon.

Kurado furioziĝas:

- "Klarigu pri skandalo!"
- "Nature gruoj kriplaj fariĝas,
afero do banala."

- "Portempe ĉesu ni bruojn,
al mi vi montros tamen
unupiedajn sur marĉo gruojn
aŭ pardonpetos vane."

Venont maten' ilin trovis
sur marĉo en arbustoj
kaj dekdu gruojn vidi jam povis
ĵus ant' iliaj brustoj.

Kikibjo flustras: - "Sinjoro,
revenu hejmen ni jam,
videblas klare en la aŭroro
l'unupiedajn ĉiam."

- "Hu, huu!" - elinter arbedoj.
Kurado laŭtekkriis.

La kojn' de gruoj sed dupiedaj
en la ĉielon iris.

- "Nun ank' vi estas fieraj?"

- "Sinjoro, kulpo via,
ĉar ja vi povus ankaŭ hieraŭ
'hu' dum l'regalo krii."

Maria: Kaj kio poste okazis, Giovan8?

Giovan8: Psst... Maria, ĉi momente ni rakontu unu el historioj de Kalandrino,
firenza stultulo kaj avarulo. Ho, Kalandrino!

/La kurteno de pupscene disŝovas. En la sceno estas grandega lito./

Kalandrino graveda

/sur sceno staras tri amikoj, firenzaj artistoj/

Bruno: Majstro Ĝiovano, via amikino Maria estas trista...

Ĝiovano: Kion signifas viaj vortoj, pentristo Bruno?

Bruno: Ke vi ne voku la lupon el arbaro.

Ĝiovano: Vere, mi ne povas kompreni vian respondon.

Bruno: Zorgu pri Maria kaj Kalandrinon lasu al ni.

Ĝiovano: Sed kial?

Bruno: Baldaŭ ĉio klariĝos. Kaj nun silentu. /al la amikoj/ Nelo kaj Bufalmako, mi sekrete eksciis, ke Kalandrino ricevis heredon post lia onklo. Eĉ naŭ mil dukatojn. Ĉu viaj artistaj stomakoj ne sentas bezonon festeni? Almenaŭ unufoje en jaro?

Nelo: Ne moku nin. Tamen kiamaniere la monon detiri de tiu ĉi avarulo?

Bufalmako: Vere, ne eblas.

Nelo: Malsata kaj soifa mi estas, amikoj. Ne parolu plu pri la mono, kontraŭ kiu manĝo kaj drinkaĵo kaj knabinoj...

Bruno: Mi havas ideon... /Li mansvingas al amikoj, ili alproksimiĝas al si, ion flustras. En scenon eniras Kalandrino./

Kalandrino: /kantas/

Feliĉa estas mi ege	Kaj kio estas mi? Krimoj?
ĉar fine mortis onkl'.	Aŭdacas iu dir'?
Da mon' li havis multege,	Mi amaŝ monon, virinojn.
Ĵam ne ĉagrenas morg'.	Mi aĉa? Estas pli.

Amikoj miaj artistoj
splendor' atestas pri,
urbanoj do, vi ne risku,
majstr' Kalandrino mi!

/parolas/ Saluton, Nelo. /Nelo apartiĝas de amikoj kaj proksimiĝas al Kalandrino/ Via lasta pentraĵo enhavas iujn malperfektaĵojn...

Kial vi min tiel observas?

Nelo: Ĉu hodiaŭ nokte nenio al vi okazis, Kalandrino? Via aspekto estas iom stranga.

Kalandrino: Je la vundoj de Kristo, ve al mi! Kiajn ŝanĝojn vi rimarkas en mi?

Nelo: Vi ŝajnas al mi multe ŝanĝita... Sed povas esti tio signifas ion alian... Adiaŭ! /li foriras/

Kalandrino: Kion vi diris, Nelo... Fakte mi ne fartas bone. Iu podagro, aŭ... Ho, malbone kun mi...

Bufalmako: /kvazaŭ preterpasante/ Bonan ta... Kalandrino, mi ne scias, ĉu ĉi tago estas bona por vi? Vi aspektas la tre suferata homo. Aŭ pli ĝuste...

Kalandrino: Pli ĝuste kio? Bufalmako, diru, je la glavo de sankta Paŭlo, diru!

Bufalmako: Io ĝi estas, mia kara Kalandrino, ĉar laŭ mi vi aspektas duonkadavre. Iru al kuracisto, mi kuras al Ĝaneta. /li foriras/

Kalandrino: Dio, la morton mi sentas en ostoj. Kun mi estas vere tre malbone, Ho, mi sentas iun doloron en miaj intestoj kaj en la koro. Eble mi enlitiĝu, vere ri estas morte malsana...

Bruno: /proksimiĝante al Kalandrino/ Kalandrino, je la virto de via edzino, kiel vi aspektas? Pli simila vi estas al la kadavro, ol al la homo. Kio okazis kun vi?

Kalandrino: Vidu, mi tremas per tuta korpo. Vere, mi sentas grandan malforton. Bruno, diru, kion mi faru?

Bruno: Kion al vi konsili? Estos plej bone, se vi revenos hejmen, kuŝiĝos sub la kovrokusenegon kaj sendos por la barbisto Simono, kiu vin favorante volonte vin eltiros el la ambaraso. Sed eble li ne volos.

Kalandrino: Ne povas esti, majstro Simono devas helpi al mi. Mi volas esti kun vi, amikoj. Do mi kuras hejmen... Mi petegas, sendu por Simono, li konsilon trovos.

Bruno: Evidente, Kalandrino. Ni faras ĉion al la amikoj... /Kalandrino foriras, enlitiĝas kaj la trio de amikoj estas denove kune/ Ni sukcesis.

Li ekkredis sian malsanon.

Bufalmako: Mi opinias, ke dum kelkaj tagoj ni abunde drinkos kaj manĝos.

Bruno: Ankoraŭ iom da pacienco, amikoj. Nun mi iros al Kalandrino, kaj vi al Simono. Laŭ nia interkompreno. Ĝis la... /ili disiras, Bruno proksimiĝas al lito de Kalandrino/ Kiel vi fartas, kompatinda Kalandrino.

Kalandrino: Terure. Helpu al mi, amikoj!

Bruno: Ne ĉagrenu, amiko. Nelo kaj Bufalmako jam iris al Simono kun viaj akvoj kaj sendube en daŭro de horo ili kunportos la respondon pri la speco de via malsano.

Kalandrino: Kun kiuj miaj akvoj? Ja mi ne donis al ili mian urinon.

Bruho: Kalandrino, vi jam deliras, karulo. Kial vi ne donis? Ĉu vi forgesis, kiam malantaŭ la domo vi pisis en la kruĉeton?

Kalandrino: Granda ĉielo! Do mia memoro ankaŭ komencas malsani. Kaj ĉu edzinon mi havas, Bruno?

Bruno: Jes, edzinon vi havas. Nur gefilojn ankoraŭ ne.

Kalandrino: Kion vi diras? Mi ne havas gefilojn. Mi ne memoris.

Bruno: Nenio perdita. Gefilojn vi ankoraŭ povas havi.

Kalandrino: Ĉu vere, Bruno? Kaj ĉu mi havas tion, kio kaŭzas la dikigon de virono, amiko?

Bruno: En tuta ordo.

Kalandrino: Dank' al Dio!

/Eniras Nelo, Bufalmako kaj Simono./

Nelo: Ni jam estas!

Bufalmako: Kaj ni venigas la kuraciston. Majstro...

Simono: Terura bildo. Delonge ni ne vidis tiel malsanegan homon. Ni mezuros la pulson, Kalandrino.

Kalandrino: Majstro...

Simono: Nur trankviliĝu, nur trankviliĝu... /li mezuras la pulson, pririgardas la okulojn de Kalandrino, korpesploras/ Menio terura, Kalandrino. Vi simple estas graveda.

Kalandrino: Kion vi diris, majstro?

Simono: Ke vi gravedas.

Kalandrino: Dio, kion faris al mi mia edzino?! Multfoje mi ŝin avertis, sed ŝi ĉiam voĉs esti supre! Kaj okazis. Kion mi nun faros?!

Nelo: Vi naskos, Kalandrino. Jen bela tasko.

Bruno: Ni flegos vin.

Kalandrino: Tra kie mi naskos?

Bruno: Ni trovos iun solvon.

Kalandrino: Mi ne volas, mi ne volas! Savu min, majstro... La Dio ŝin perdigu. Se ĉio feliĉe finiĝos, mi ĵuras, ŝi antaŭe mortos pro la avido, ol mi permesos ion similan! Ĉiam supre... Ho, neĉiam plu supre!

Simono: Mi helpos al vi en la malsano, vi estos savita, Kalandrino, se vi ne domagos la monon por la medikamentoj, kiujn mi rekomendos.

Kalandrino: Mi petegas vin en la nomo de ĉiuj sanktuloj. La mono ne gravas. Nur savu min, kara Simono! Mi aŭdis, kiel virinoj kriegas dum akuŝo, kvankam ĉiun naskeblon ili posedas. Mi estas konvinkita, ke mi mortus antaŭ ol mi akuŝus la infanon.

Simono: Trankviliĝu. Mi tuj preparos la bongustan trinkaĵon, kiu dum la semajno kuracos vian suferon. Sed al preparo de la trinkaĵo oni bezonas kelkajn grasajn kaponojn, la duonon de la bovo, por ekstrakti la medolon de iliaj ostoj, kelkajn galjonojn da kreta vino kaj ankoraŭ kelkajn aliajn specialaĵojn, jam ne kalkulante aliajn miksaĵojn.

Kalandrino: Majsto, mi petegas, jen mia monsako. Disponu pri ĝi, aĉetadu ĉion necesan al preparado de la trinkaĵo, kaj miaj amikoj al vi helpos. Savu min, savu!

Simono: Bone, Kalandrino. Mi promesas al vi, ke post tri tagoj vi denove estos sanega. Ni iru do amikoj por aĉetadi, kaj vespere, Kalandrino, vi

havos vian trinkaĵon.

/flanke/

Bufalmako: Nur la monsakon vi ne havos, tamen ni havos plenaĵn ventrojn...

/Ĉiuj foriras. La lumo de pupsceno estingas, kurteno
kunŝoviĝas./

Giovano: Dum tuta semajno Kalandrino trinkis la vinon kun spicoj. Post la semajno li resaniĝis, sed la monsako ne revenis al li. La prezo de la stulteco, estimataj spektatoroj, povas esti granda.

Sed, sed Maria - ni drinkas ĉi tie la vinon kaj la langoj de niaj gastoj al palatoj alsekiĝis. Do ili ĝoju kun ni, la vino malfermos ilin al si reciproke, ili amu sin, ĉar la vivo astas mallonga.

/Maria prenas la kruĉon de vino, verŝas en pokalojn de gastoj. En tiu ĉi tempo Giovano kantas./

Balado la ĉarmon de vino laŭdanta

Kiam la mond' suŝokas vin avide
Kaj papili' de trist' jam ŝvebas en krepusk'
- kiel vi daŭru, kie dormu fide,
la sincer veron ĉu instruas monda brusk'?

Tiam pokalon prenu kun la vino,
tuj rozkolora iĝos griza, trista fon',
brakojn al vi etendos ĉarmulino
kaj birdoj la ĉielon levos super mond'.

Velu ni tra la vinrivero
en spacon de la vort' de ĉarm',
kiel aŭtuno per oreroj,
min tuŝos de blank songoj svarm'.

Ie ni lasos sortetecon,
la vundojn de mensog'...
al mi apertu do tutecon,
pokal' jen la arog'.

Kiam la veron fiksas vort' de reĝo,
kun nia blinda kred' kaj la poltrona "jes",
Kiam la pugn' malstreĉas pro la seĝo
la signo de l'almoz', anstat' frakasa gest'.

Tiam pokalon prenu kun la vino,
vi jam malvenkis, hom', vi - vrako de l'epok',

vi komencigas silentrondan sinon,
do drinku - eble vin instiga taúzos ŝok'.
Velu ni tra la vinrivero...

Giovano: Mi deziras al vi ankoraŭ diri, ke ĉiam venko de la boneco dependas
de la ideo kaj de ĝia kuraĝeco.
Kaj nun - kiel diris mia pli juna amiko dum la horo de sia morto -
- pli multe da lumo!

/La lumoj malestingiĝas - la paŭzo. Maria verŝas la vinon en pokalojn
de lastaj gastoj. Giovano atendas ŝin, poste ili kune
foriras./

La fino de la unua parto

D U A P A R T O

=====

Giovano: La duan parton de nia libro "Dekamerono" komencante, ni amuzu niajn gastojn per kanto. Kaj ĝi estu la rakonto baladforme kantata.

/Ĝiovano kaj Maria kantas la baladon laŭ novelo "Ĉion kulpas la vosto"/

Balado pri la vosto

Malriĉaj iam vivis
onkl' Pjetro kaj pastr' Ĝano,
azenon unu gvidis,
la dua la ĉevalon.

Puliajn vojojn vagis
dum vintro kaj somero,
amike ili agis
precipe en danĝero.

Donadis reciproke
gastamon ili reĝe,
kabanojn kvankam moke
posedis etajn leĝe.

Kabane kun edzino
dum nokto dormis Pjetro,
do Ĝan' kun ĉevalino
restadis en staletto.

Modesta Ĝan' klarigas,
ke Pjetro ne kombinu,
ĉar nokte li ŝanĝigas
de ĉevalin' knabinon.

Aŭdinte la edzino
al Pjetro tuj ordonis,
ke l'pastron kun obstino
instigu l'sorĉon doni.

- "Dum tago kun l'azeno
mi helpos tiri ĉaron,
vespere post reveno
reestos ni amparo".

- "Gekaraj, petojn ĉesu..." -
defendis pastro Ĝano,
sed ili plu agresis,
defendo estis vana.

- "Nu, se vi vere volus... -
rezignis la amiko -
sed eĉ se iu bolus,
atingos ni efikon.

"Nek tamen vorton diru,
eĉ io ajn fariĝu...
Nun Pjetro flankeniru,
edzino senvestiĝu!

"Ĝi estu kolhararo,
fariĝu ĝi oreloj..." -
Li per nervoza faro
ekglatis perineon...

Tremiĝis kaj tenonon
kavigis ĝis la osto,
finante l'sorĉordonon:

- "Estiĝu ĝi la vosto!"

- "Ho, Ĝano, lasu... pacon!" -
ekkriis Pjetr' rikana.

- "Ne haltis vi buŝaĉon
kaj sorĉoj estas vanaj."

- "Vi ĉion, edz', difektis" -
ŝi kriis malkontente.
Sed moralaj' aspektis,
aŭskultu vi atente:

"Eĉ estu la mizero,
pagigu sort' kromkoston,
sed al l'edzino vere
aligu propran voston."

Giovano: Ĉu ni, Maria, iujn malkonvenaĵojn ne rakontis?

Maria: Mi supozas, ke la oreloj de niaj spektatoroj malpli indajn vortojn aŭdis, kaj la buŝoj ankaŭ...

Giovano: Silentu, Maria.

Maria: Estimon vi ne havas ĉe firenzaj mecenatoj, Giovano, kaj eĉ havi vi ne povas. Vi elektis propran vojon en vivo kaj ĝin jam ne forlasu. Ĝi estas la via. Kaj nun rakontu alian historion.

Giovano: Muzo mia vi estas, Maria. Do en urbo Kapsa en Barberio loĝis antaŭ multaj jaroj solida riĉulo, kiu havis belegan filinon Alibekan.

/Disŝovas la kurteno de pupsceno. Konturoj de budeto, en kiu staras simpla tablo, en la fono krucifikso, apud la muro granda simpla mato kiel dormloko./

La diablo kaj infero

/La pupsceno malplena. Eniras lacigita pro la vojaĝo Alibeka,
kantante./

<u>Alibeka:</u>	Ho, koro mia laĉa, mi iras al mondfino de mia urb' sagaca al amo la fratina.	Anakoreto pia misterprofundon konas, al li animon mian konfidi mi bezonas.
-----------------	---	---

Giovano: Kristane edukita la filino decidis iri en Tebaida-n, landon de ermitoj, por ŝian animon ekzerci en asketado kaj diajn verojn studi...

Alibeka: Tamen la ermitoj strange min traktas. Ne avarinte la dian vorton, ili direktas min ĉiam en la centron de Tebaida. Dio, helpu por mi trovi favoran al mi ermiton... Ho, jen estas la sankta junulo. /elmalantaŭ la budeto iras ermito Rustiko/ Patro, instru min la servon al Dio, mi petas vin. Mi estas knabino, kiu decidis tutece sin dediĉi al tiu servo; instruiston mi nur bezonas, kiel fari tion plej bone.

- Rustiko: Jam krepuskiĝas, fratino, do kvankam kontraŭvole mi akceptos vin sub mia tegmento, tuj mi preparos al vi kuŝejon el palmfolioj kaj vi satmanĝu la radiketojn kaj la berojn, preĝante al Dio. /li kolektas la foliojn, preparas kuŝejon samtempe parolante/ Dio la homaron je la du seksoj dividis. Je la du, mi diras, disdonante al ili apartajn naturajn ecojn.
- Alibeka: Patro, tiel ne povas esti. Same ni estas infanoj diaj, same la homoj.
- Rustiko: Fratino, tamen la viro al aliaj celoj servas, ol la virino.
- Alibeka: Sed ĉu ili ambaŭ ne servas al Dio, majstro ermito?
- Rustiko: Tio ĉi ilin unuigas, sed samtempe dividas...
- Alibeka: Ĉu vere dividas?
- Rustiko: Jes, denaskaj naturaj ecoj kaj magneta inklino reciproka de la ecoj.
- Alibeka: Mi supozas, ke vi nur spitas, por elprovi mian amon al Dio.
- Rustiko: /rapide/ Jes, jes, vi pravas. Diablo estas sagaca kreito, la ruza kaj perfida. Mi pensis, ke vi, bela knabino...
- Alibeka: La bela? Kion signifas - bela?
- Rustiko: Vi ekscios, infano, en ĝusta tempo. Nun pensu pri la diablo. Lin oni devas eninferigi, forpeli de la malbonaj homaj pensoj.
- Alibeka: Kiamaniere oni devas tiun ĉi diablon eninferigi?
- Rustiko: Vi tuj vidos. Faru la samon, kion mi faras.
- /La ermito senvestiĝas, la samon faras Alibeka, rigardante lin kaŝe. Li kuŝiĝas sur sian ermitan kuŝejon, Alibeka same apud li./
- Alibeka: /ĉiam observante Rustikon/ Diru al mi, patro, kio leviĝas en via fronto, kion mi ne konas.
- Rustiko: Voku min per mia antaŭnomo, Alibeka. Mi estas Rustiko.
- Alibeka: Jes, Rustiko, sed klarigu al mi la sekreton de tiu ĉi leviĝo.
- Rustiko: Tio ĉi? Ĝi estas la diablo, pri kiu mi diris al vi. Ĝus nun li komen-

cas terure min turmenti, invadi, al inferon li volas...

Alibeka: Dankojn al Dio, ĉar mi ne vidas same abomenindan diablon ĉe mi.

Rustiko: Vere, danku pro la manko de la diablo, tamen anstataŭe la infero estas en vi. Kaj Dio mem volas, ke vi mian diablon en vian inferon akceptu.

Alibeka: Mi decidis min dediĉi al dia servo. Kial mi ne povus neniigi la diablon en la infero? Sed kie estas la infero, kiu en mi troviĝas?

Rustiko: Ho, mildigu lin, Dio, por ke li min ne turmentu tiel, ne bruligu...

Alibeka: Patro Rustiko, mi demandas pri la infero.

Rustiko: Ho, rigardu, fratino /li montras la pubon de Alibeka/ - tie ĉi estas la infero kaj ĉi tien la mia diablo enkorpigita forŝiriĝas.

Alibeka: Do li eniĝu, ne malhelpu al li.

Rustiko: /la diablon enigante en la inferon/ Estu benata, Alibeka. Mi jam sentas la moderigon kaj trankvilon.

Alibeka: Ho, Rustiko, vere la diablo devas esti la monstro kaj malamiko de Dio, ĉar enirante eĉ por la infero mem grandan doloron kaŭzas.

Rustiko: Ne ĉiam same estos, mia filino.

Alibeka: Moderigu ĝin, patro Rustiko... ho... grandan suferon kaŭzas kruelulo... Dio, al vi mi oferas miajn suferojn... ho...

Rustiko: Mi sentas... mi sentas, ke li min forlasas... mi sentas, ke liaj kornoj malgrandiĝas... la mildigon mi sentas.... hoooo...

Alibeka: Eble li jam bone sentas sin, ĉar mi ankaŭ sentas malpli grandan doloron. Malbona diablaĉo...

Rustiko: /kuŝiĝante apud Alibeka/ Nokto ekregas Tebaidan. Jam krepuskiĝis. Sed ni ankoraŭ ne postulu dormon. Mi antaŭsentas, ke ankoraŭfoje mi devos lin eninferigi. Persistas min aĉulo. Nun trankvila, post momento denove min invados, brulante intestojn kaj devigante min pretigi al li la inferon.

Alibeka: Ĉion mi suferos. Tial mi ja almigris en tiun rifuĝejon...

Rustiko: Kaj ĝuste vi faris, Alibeka. Ĉar estas, kiel mi supozis. Pretigu vian inferon...

/La fenestro de pupsceno malheliĝas, en la fono: "J'ai t'aime"/

Giovano: La vivo de la ermito ne estas facila; kvankam Rustiko estis junulo, tamen manĝante radiketojn, berojn kaj trinkante nur fontakvon, rapide li kontentigis sian diablon kun helpo de infero de Alibeka. Pasis kelkaj tagoj...

/La scenejo denove lumiĝas. Rustiko sidas sur la kuŝejo, Alibeka staras apud li./

Alibeka: Nun mi konvinkiĝis, ke pravis la bonanimuloj de Kapsa dirante, ke treege agrable estas servi al Dio. Ĉar vere mi ne rememorigas iun alian laboron tiom da ĝuo portantan, kiu estas la inferigado de la diablo. Tial mi petas vin, Rustiko - mi alvenis ĉi tien por servi al Dio kaj ne mallabori. Do ni eninferigu la diablon denove.

Rustiko: Post kelka tempo, Alibeka, post kelka tempo...

Alibeka: Post kelka tempo, vi diras. Ĉu li ree post kelka tempo tiel rapide el infero forkuros? Vere mi ne komprenas kaj ŝajnas al mi stranga, ke li tiel mallonge en la infero restas. Ĉar se li same volonte restas, kial la infero volonte lin akceptas - neniam li bezonus deinferiĝi.

Rustiko: Aŭskultu min, Alibeka. La diablon nur tiam oni devas eninferigi kaj sufoki, kiam li tro alte la kapon levigas.

Alibeka: Sed komprenu, Rustiko, ke via diablo jam bridita vin ne suferigas, dume tamen mia infero min maltrankviligas. Faru do bonan agon kaj helpu per via diablo bridi rabion de mia infero, same kiel mi helpis per mia infero humiligi arogantecon de via diablo.

Rustiko: Mi tre volus helpi al vi, sed mia diablo en humileco restas.

Alibeka: Do diru al li, ke li devas pretiĝi tien, kie estas lia destino - do en inferon mian.

Rustiko: Mi persvadis tion al li, sed li obstine rifuzas.

Alibeko: La diablo devas sidi en la infero!

Rustiko: Jes, jes, trankviliĝu, Alibeka. Vi pravas, sed li iomete ankaŭ la pekulojn ekster la infero tentu...

Alibeka: Kaj vi diras tiel, monako?! Al diablo vi volas helpi en tentado de bonaj animoj?!

Rustiko: Sed komprenu, kara Alibeka. Mi nenion diris kontraŭ diaj leĝoj. Vere mi volus, ke la diablo ĉiam en infero restu, sed tiaj la leĝoj...

Alibeka: Mi ne volas tiujn leĝojn; Rustiko, mi petas, eninferigu la diablon... mi petas, tie lia destino...

Rustiko: Pli forta li estas ol mi. Kiam li volas eninferiĝi - bari al li mi ne povas, kiam li ne volas - perfortigi lin mi ankaŭ ne scipovas.

Alibeka: Do mi komprenu, ke via diablo en mian inferon ne iros?

Rustiko: Eble morgaŭ, Alibeka...

Morgaŭ?!

Alibeka: Morgaŭ alian inferon li serĉu. Mi iros kun mia infero plu en Tebaidan. Sendube mi trovos la homon, kiu estos por mi pli kompatema. Adiaŭ, Rustiko... /ŝi foriras/

Rustiko: Dank' al Dio... Sed vi, la diablo... hontu!

/La fenestro de pupsceno mallumiĝas./

Maria: Giovano, tiu rakonto tre maldeca al mi ŝajnis.

Giovano: Sed ĉu nevera?

Maria: Mi ruĝiĝas, Giovano. Ĝi estas la intima sfero, kiu koncernas du ge-homojn.

Giovano: Sed ĝi estas belega sfero, Maria. Kaj nun permesu la gastoj, jen nia malnova konatulo Kalandrino.

Amaventuro de Kalandrino

/La dekoracio: kastela salono dum pentrado; post turnigo: la korto kun puto, flanka muro de kastelo kaj aperta pordego de garbejo/

Kalandrino: /kantas/

Mi estas Kalandrino, Ĉar ankaŭ la artisto
aŭskultis vi pri mi jam, mi estas multtalenta,
kontraŭ la mon' kaj vino virinoj do kun tristo
mi pentros domon vian. pro am' al mi silentas.

Edzino hejme restis
kaj mi la bird' libera
ĉi tie fine nestis
senbridan amon veran.

Bruno: /enirante/ Kion vi diris, Kalandrino?

Kalandrino: Mi diris, amiko, ke ni bone faris forveturante el Firenzo. Ĉar ĉi tie, en la palaco de Nikolo CORNACCHINI /Kornakini/ en Kamerata mi ripozos de mia Tesa, kaj sendube mi ekplaĉos al iu belega knabino, kiu ekamos min je la morto kaj la vivo. Kion vi pensas, Bruno, pri Nikolosa, konkubino de sinjoro Nikolo?

Bruno: Aŭskultu, Kalandrino, ni veturis ĉi tien por labori. Dum monato ni devas finpentri la freskojn en tiu ĉi ĉambro, do ne babilaĉu, ne okupiĝu pri stultaĵoj, sed antaŭe rigardu la spegulon kaj poste komencu prepari la farbojn.

Kalandrino: Kial mi rigardu la spegulon?

Bruno: Por vidi vian aĉan staturon.

Kalandrino: Mi opiniis vin mia amiko.

Bruno: Mi vere estas. Tial mi deziras al vi la bonon.

Kalandrino: Vi ne konvinkos min. Mi pruvos al vi, ke Nikolosa-n mi deprenos de sinjoro Nikolo, ke mi estas digna kaj belega viro. Rigardu mian noblan vizaĝon, originalan staturon, kaj en pantalone mi ja ŝtonojn ne portas.

Bruno: Fakte, Kalandrino, fakte, sed vi ne povas tutan laboron al ni lasi, ĉar ni prenis vin ja por helpo en Kamerata-n...

Kalandrino: Mi scias, mi scias, Bruno. Do mi iras por la akvo. /li eliras/

Bruno: /al si mem/ Sed tamen oni povas Kalandrino primoki kaj amorojn forigi de lia kapo. Ho, Nelo! Bufalmako! Venu ĉi tien!

/La amikoj alvenas./

Nelo: Kio okazis? Kial vi deturnas nin de la laboro?

Bruno: Mi devas konfidi al vi unu historion kaj ni kune devas elpensi ion, por alordigi Kalandrino. Alproksimiĝu. /Ili ekstaras tre proksime unu al la alia, ion flustras. La dekoracio turniĝas./

/Al la puto proksimiĝas Kalandrino. Apud ĝi staras Nikolosa, kiu atente observas alproksimiĝantan monstron./

Kalandrino: Estu salutita belega kaj ĉarma madono.

Nikolosa: Estu salutita sinjoro...

Kalandrino: Kalandrino, favora madono.

Nikolosa: Certe antaŭ nelonge vi alvenis en la kastelon?

Kalandrino: Jes, sinjorino, ĝuste ĉi tie mi alvenis ĉi tien kune kun miaj amikoj pentristoj.

Nikolosa: Ĝi signifas, ke vi estas...

Kalandrino: Fakte, madono, mi estas artpentristo.

Nikolosa: Ĝi estas la profesio inda nur por tiel belstaturaj homoj, kiel vi sinjoro.

Kalandrino: Fakte, madono, nur por tiaj viroj, kiel mi.

Nikolosa: Vi, artistoj, sendube estas fieraj?

Kalandrino: Fakte, ni estas fieraj.

Nikolosa: Kaj indiferentaj por la plezuroj de la mondo?

Kalandrino: Fakte, la indiferentaj.

Nikolosa: Ho, neniam la sorto akordas kun miaj ideoj, ho Dio, Dio...

Kalandrino: Kion vi diris, sinjorino? Se bone ŝajnas al mi, iu pezo premas vian koron.

Nikolosa: Ĉar vi artistoj certe kaj virincjn malestimas?

Kalandrino: Fakte, ni malestimas, tio signifas... dependas, ĉu la virino taŭgas nian amon. De taŭga virino fluas la inspiro.

Nikolosa: Kaj ĉu mi al vi, gracia artisto...

Nikolo: /elekster la sceno/ Nikolosa! Longe min vi devigas atendi.

Nikolosa: Ho, bedaŭrinde mi jam devas iri. Vi estas eksterordinara viro, sinjoro Kalandrino. Ho... /suspirante kaj rerigardante ŝi foriras en la kastelon/

Kalandrino: /prenate la akvon/ Vi ne ridos pri mi, kunuloj. Vi vidos, kiu estas Kalandrino. La aglo, la satano, la viro! Vi vidos, kunuloj.

/Li portas la akvon, samtempe turniĝas la dekoracio/

Bufalmako: Nu, jam iru, rapidu Nelo, antaŭ ol Kalandrino ne revenos. Estu antaŭ la vespero.

Nelo: Mi faros ĉion laŭ la interkonsento. Saluton! /li eliras, elekster la sceno aŭdiĝas falsa kantado de Kalandrino/

Bruno: Kio okazis, je diablo, kamarado Kalandrino?

Kalandrino: Ho, amiko, se vi scius! Mi interparolis kun ŝi.

Bruno: Kun kiu?

Kalandrino: Kun Nikolosa.

Bruno: Kaj kio?

Kalandrino: Ho, mirinda!

Bruno: Ĉesu suspirojn kaj diru pri kio temas.

Kalandrino: Do pri tio, ke vi ne pravis. Mi estas je unu paŝo de konkero de tiu knabino. Mi nur ne scias kiamaniere trompi tiun sinjoron Nikolon. Ŝi jam amas min, jam suspiras je mia vido, jam ŝi pretas iri kun mi ĝis la fino de l' mondo...

Bufalmako: Kaj en la fojnon?

Kalandrino: Sciu, ke en la fojnon ankaŭ. Sed ĉu iu el vi pretus helpi al geamantoj? Ĉu iun el vi interesas la granda amo?

Bruno: Trankviliĝu, Kalandrino. Se tia estas la afero, mi vin pardonpetas,

stultaĵojn mi iam klaĉis. Ni tuj pensos kun Bufalmako, kiamaniere helpi al vi.

Kalandrino: Mi fidis, ke viaj animoj estas same artistaj, kiel la mia! Nur Nelson vi ne enkomplotigu, ĉar li ja estas parenco de mia edzino Tesa kaj li pretas absurdaĵojn al ŝi klaĉi.

Bufalmako: Ne ĉagrenu. Ni forsendis lin en Firenzon pro farboj.

Bruno: Do ni agu, Bufalmako. Iru al sinjoro Nikolo kaj provu, babilante kun li, fortiri lin al rivero Arno, aŭ ankoraŭ pli malproksimen. Mi male iras al sinjorino Nikolosa kaj... kion mi diru al ŝi, Kalandrino?

Kalandrino: Ho, diru al ŝi komence, ke mi sentas en mi mil kvaronojn da tiu dia suko, kiu rondigas virinojn, poste diru al ŝi ankaŭ, ke mi estas ŝia servanto kaj demandu, ĉu ŝi ion de mi postulas. Ĉu vi min bone komprenis?

Bruno: Bonege, mia Kalandrino, kaj nun plenfidu al ni kaj atendu. Ni agu, Bufalmako. /ili foriras/

Kalandrino: /restante sola li kantas/

La simpati'
ardegas pri
la rev' al vi -
la ambrozi'.

Belega roz'
kun brila ros' -
apoteoz'
de cica gros'.

Vi aventur'
ĉarm' de femur'
de ĝi velur' -
plej grand plezur'.
De vi avid' -
neebla brid',
pens' pri koit' -
mord' de aspid'.

Ho, amatin',
vizitu min,
oferu vin
en am' sen fin'.

/Revenas Bruno/

/li parolas/ Kaj kio? ĉu vi ŝin vidis?

Bruno: Fakte... tio signifas, ke la knabino ne unu, sed milfoje promesis plenumi ĉion, kion vi deziras.

Kalandrino: Do ni ne prokrastu, ĉar la volupto miajn intestojn bruligas.

Bruno: Estas unu embaraso.

Kalandrino: Kiu, diru?

Bruno: Ĝi tremegas de la timo pro sinjoro Nikolo, kaj antaŭ ĉio pro Dio-Sinjoro.

Kalandrino: Pro Dio-Sinjoro, vi diras? Ho, malfacila afero.

Bruno: Nur unu solvo estas.

Kalandrino: Mi petegas, diru kia?

Bruno: Mi havas la satanan talismanon, per kiu tuŝita virino iros kun vi humile kaj obeeme. Sed ĝi estas la satana.

Kalandrino: Dio, ĉi foje vi pardonos al mi, ĉar mi plu ne eltenos... Aŭskultu, Bruno, alpruntu al mi tiun talismanon!

Bruno: Ĉu vi scias, kion vi kuraĝas?

Kalandrino: Pruntu al mi, amiko, mi petegas...

Bruno: Vi mem tion volis, Kalandrino. /li transdonas iun aĵon/

Kalandrino: Mi dankas al vi kore, amiko. Nun ŝi estas la mia! Adiaŭ! /li forkuras/

Bruno: Nelo jam devas esti ĉe urba bariero de Kamerata... Mi proksimiĝos al la fenestro, /La dekoracio turniĝas: la korto, malfermita pordego de garbejo/ ... kaj observos vere tre komikajn situaciojn.

/Apud la puto staras Nikolosa, al ŝi proksimiĝas Kalandrino kaj tuŝas ŝin per la talismano. Ŝi silente postiras lin en la garbejon. Ili ekstaras unu apud la alia./

Kalandrino: Longe, longe mi atendis ĉi tiun momenton, Nikolosa.

Nikolosa: Jes, mia sinjoro.

Kalandrino: Do ni ne perdu la tempon.

Nikolosa: Ĉu ni ĝin perdus?

Kalandrino: Mi deziregas vin, Nikolosa.

Nikolosa: Jes, mia sinjoro.

Kalandrino: Do ni vane perdas la tempon.

Nikolosa: Jes, mia sinjoro.

Kalandrino: Kuŝiĝu do.

Nikolosa: Jes, mia sinjoro.

Kalandrino: Do ne staru kaj ni kuŝiĝu en la fojnon.

Nikolosa: Jes, mia sinjoro.

Kalandrino: Mia sinjoro kaj mia sinjoro... Nenion alian vi scias paroli kaj fari?

Nikolosa: /turniĝante al la fenestro, en kiu videblas la vizago de Bruno/ Jes... sinjoro, ni kuŝiĝu kaj vi malfermu al mi ĉielon de la amo...

/Kalandrino ĵetas sin al Nikolosa, provas ŝin senvestigi, baraktado... En tiu ĉi momento en la korto aperas Tesa, ŝi vidas Kalandrinon kaj Nikolosan, kuras en la garbejon kriante./

Tesa: Vi, maljuna kripla hundo! Tiel vi min traktas?! Malbenita estu la amo, per kiu mi al vi min oferis, kanajlo! /ŝi batas Kalandrinon kaj Nikolosa forkuras/ Jen la amorulo fortika! Ĉu vi vin ne konas, kadukulo?! Ja eĉ per la premilo unu guton de suko oni nevas de vi elpremi! Ĉi foje ne pere de mi vi gravediĝos, sed pere de tiu friponino. Vere sentaŭgulino ŝi estas, tiun kadukan juvelon ekavidinte!

Kalandrino: Tesa! Tenjo! Pardonu je Dio!

Tesa: Mi jam ĉion pardonos al vi, maljuna ĉevalaĉo! Mi jam benos vin antaŭ la ama vojo!...

/La lumo en scenfenestro estingiĝas. Ankoraŭ aŭdeblas la krioj kaj frapoj./

Giovano: Silentu, Kalandrino, silentu. Simple tia okazas la fino de amaventuroj. Forton kaj aliajn talentojn de niaj virinoj ni konas kaj kontraŭstari ni ne sukcesas, eĉ se grandaĝo kaj laceco tiun kontraŭstaron nature helpus. Ĉu vi, Maria, memoras Maseton de Lamporekio /LAMPORÉ-CCHIO/?

Maria: Jes, sinjoro.

- Giovano: Maria! Vekiĝu!
- Maria: Jes, sinjoro.
- Giovano: He, ripetu tion ĝissate, nur miaj sukroj elfluon trovu.
- Maria: Jes, sinjoro.
- Giovano: Ĉu vi volas min priŝakri, kiel Nikolosa Kalandrinon?
- Maria: Jes, sinjoro.
- Giovano: Kion vi diris?
- Maria: Nenion... nenion, sinjoro. Ni kantu la baladon pri Maseto.
- Giovano: Jes, sinjorino...

Balado pri lupo en ŝafstalo

/laŭ novelo "Lupo en ŝafstalo"/

La monakej' estis iam
domo de pi fratinoj,
Maseto florojn iliajn
flegis kun grand estimo.

La knabo estis gracia,
tamen - miriga kaŭzo -
mutulon ŝajnis li ĉiam
surdan eĉ ĝis la naŭzo.

Sed monakinoj decidis
knabajn profiti ĉarmojn,
de votojn sanktajn forigis,
petis lin: - "Knabo amu, /amu, amu/!"

La ĝardenisto malsobra
penis agadon daŭri,
profito estis duobla:
floroj, infanoj svarmis.

La monakinoj ja certis
gardon de amsekretoj,
ne devis l'knabon averti,
plaĉis al li ludetoj.

Ĝis tiam tamen rezidas
lupo en la ŝafstalo,
ĝis kiam ne enŭigas
lin sukces' sen batalo.

Monatoj kelkaj trapasis
kvietaj en monakejo,
Maseto laca forlasis
dolĉan sed tro l'areon.

Forkuris do la riĉaĵojn
fine kriante forte:
- "Tro multe, tro da dolĉaĵoj,
eĉ vomus tion perko!"

- Giovano: Estimataj sinjorinoj, estimataj sinjoroj, kantita balado estis preskaŭ "mi kredas" de l'amo. Malgraŭ tio, kion ni rakontis antaŭe kaj kion ni ankoraŭ rakontos, la modereco en la amo estas plej grava. Estimado ni nian plej grandan trezoron, havigitan al ni pere de la naturo, kiu la agrableco kaj kapableco de amado estas. Ĉar alvenos la maljuneco

griza, sur la bastono apoganta... Ĉu vere, sinjoro Rikardo de Kinzika
/CHINZICA/?

Kalendaro de maljunaj edzoj

/En la fenestro de pupsceno aperas maljuna juĝisto Rikardo./

Rikardo: La trista vero, majstro Giovanu. Mi spertis ĝin dolore, kvankam juste.
Kaj aŭdu, kio okazis.

/li kantas/

Eble juĝisto tre saĝa,	Prenis mi junan edzinon,
Rikardo nomo mia,	ĉar tiam sango bolis,
tamen mi estas grandaĝa,	nun tamen de l'ardo - fino,
grizhara kapo tia.	l'aĝ' kapon aŭreolis.

/li parolas/ Ĉu vi scias, ke saĝeco ankaŭ estas limigita. Mi edziĝis
al belega juna Bartolomea. Ne prijuĝu min malbone, same kiel mian
maljunan staturon. He, povas mi ankoraŭ ion... Bartolomea, vi estas
mia edzino...

Bartolomea: /enirante en la dormĉemizo/ Jes, sinjoro.

Rikardo: Mi diros al vi, junulino, ke tre bone vi faris, al mi edziniĝinte,
ĉar malgraŭ mia grandaĝo, mi estas ja plej bona juĝisto en Firenzo.
La homo saĝa kaj solida...

Bartolomea: Ni estas la solaj, sinjoro...

Rikardo: Vi pravas, sinjorino. Tial mi devas klarigi al vi, kiun trezoron vi
posedas. Mia saĝeco fama estas en la tuta urbo kaj mia bieno...

Bartolomea: Ni estas la solaj, sinjoro...

Rikardo: Antaŭe, kolombineto, mi devas al vi klarigi...

Bartolomea: Sed kiam vi jam finos, sinjoro, atentu mian junecon.

Rikardo: Ho, vi senpacienkulino, belega kaj juna... /komenciĝas la erotika
sceno/ Vi perfortas min kaj saĝecon mian... Sensojn mi perdas...

Bartolomea: Ankoraŭ, sinjoro, ne bedaŭru tiun perforton...

Rikardo: Kion vi sentas?

Bartolomea: Miraklon, sinjoro.

Rikardo: Ĉion ĉi la intelekto kaŭzas. La intelekto, kolombineto mia...

Bartolomea: Ne diru multe, sinjoro. Restu, kiel nun vi estas.

Rikardo: Do revenante al la ecoj de la intelekto...

Bartolomea: Sinjoro! Kio fariĝas kun vi?!

Rikardo: Ĉe mi ĉio en la plej bona ordo.

Bartolomea: Sed mi jam vian volupton ne sentas. Sinjoro Rikardo, ŝanĝu la intelekton je la fortiko!

Rikardo: Tion ĉi ankoraŭ ne unu foje ni faros, kaj nun ni babilu.

Bartolomea: De la babilado neniu konkreto efikos. Faru ion ajn, sinjoro...

Rikardo: Ja mi faras, kion mi povas, sed aldoniĝojn vi devas atendi, kolombineto, ĉar...

Bartolomea:
Mi ne volas atendi, sinjoro.

Rikardo: Rigardu, kiel belega aŭroro estas malantaŭ la fenestroj.

/Kelkaj flagrantaj lumoj signas la pasadon de tempo, dum la flagrado
- la flirtado de Bartolomea al la maljuneca Rikardo./

Rikardo: Hodiaŭ oni ne povas, kolombineto mia.

Bartolomea: Kial, sinjoro?!

Rikardo: Ĉar hodiaŭ oni devas bridigi la korpajn voluptojn: la fasta tago venis.
Hodiaŭ estas festo.

Bartolomea: Kaj morgaŭ?

Rikardo: Kaj morgaŭ estos antaŭtago de Pasko.

Bartolomea: Do, sinjoro?

Rikardo: Do oni ne povas dum la festo.

Bartolomea: Do postmorgaŭ?

Rikardo: Vi estas mia suno. Sed rigardu la kalendaron. Vi ja konfesas kaj scias

kiuj fajroj kaj punoj inferaj atendas tiujn, kiuj fastojkaj festojn ne respektante - sindonas al korpaj ĝuoj.

Bartolomea: Jes, sinjoro, mi scias, sed via kalendaro dum ĉiu venonta tago kreskas. Jam malmultaj tagoj restis al mi por amado.

Rikardo: Des pli bone, filino mia...

Bartolomea: Kial vi nomas min filino, se mi edzino via estas. Kaj se estas mi la edzino - traktu min kiel la edzinon.

Rikardo: Mi traktos, traktos... sed eble, kolombineto mia, ni veturu fiŝkapti por ripozo al la maro vasta...

Bartolomea: Kial vi komencas pri fiŝetoj kaj la maro, sinjoro. Ĉu mi tial al vi edziniĝis...

Rikardo: Ne kolbru, kolombineto mia. Sur la maro ni povos diversajn aventurojn gustumi...

Bartolomea: Vi pri la aventuroj, kaj mi ja sana estas kaj la junan juriston mi volonte en la mondon eldonus.

Rikardo: Por tio ankaŭ ĝusta tempo venos, koboldeto mia, por tio ankaŭ.

Bartolomea: Sed mi volas, ke mia infano memoru la patron.

Rikardo: Ja mi ankoraŭ ne preparas min al la alia mondo.

Bartolomea: Do ĝis kiam vi povas, en mian liton vi preparu.

Rikardo: La pastro ciŝas, sed virino spitas. Ĉion, junulineto mia, oni devas laŭvice. Antaŭe...

Bartolomea: Sinjoro kaj edzo mia kara... Vi min jam ne volas, ne deziregas, kaj eble vi ^{la} alian ie kaŝas?

Rikardo: Mi amas vin, Bartolomea, pli ol la vivon. Vi estas mia suno...

Bartolomea: La suno de subiro. Mi ne volas!!!

Rikardo: Aŭskultu min. Ja edzo de vi posedata estas la homo saĝa, estimata kaj solida.

Bartolomea: Sed mi deziras, ke tiu homo estu ankaŭ vera viro, kiu povas doni al

la virino tion, kion ŝi de li postulas.

Rikardo: Do ni forfluu sur la maron. Mi scias, ke la mara vento kaj precipe la saloj de ĝi portataj vekas la volupton viran. Vi havos sur la maro...

Bartolomea: Do ni jam ne babiladu, sed vi ordonu levi la velojn.

Rikardo: Laŭ via volo. Vi vidos, kiujn diversajn petolojn via kolombeto scipovos fari, vi vidos...

/La lumoj de pupsceno estingiĝas./

Giovano: Certe vi dezirus, gajigitaj spektatoroj, observi la marajn aventurojn? Bedaŭrinde, tio ne eblas. Memoru ja, ke vi estas en ^{la} teatro, ne sur la maro, sur kiu la fama korsaro Paganino di Mare forkaptis la edzinon de Rikardo, prenis ŝin en lian palacon en Monako, kie amposedadis ŝin kiel edzinon aŭ amatinon; kaj ĉar li estis la viro potenca kaj al la amo inklina, ne estas mirinde, ke Bartolomea baldaŭ la edzon forgesis.

Maria: Kaj ĉu jam la fino de la rakonto?

Giovano: Ankoraŭ ne, ĉar Rikardo eksciis pri la sorto de sia edzino kaj tiam tuj en Monakon venis.

/Sur la pupsceno la palaca interno, unu el la oficialaj salonegoj./

Rikardo: Sinjoro Paganino, mi havas por vi grandegan peton. Mi aŭdis, ke vi tenas en la palaco mian edzinon Bartolomean. Mi estas la homo solida, saĝa kaj estiminda kaj mi okupas la postenon de juĝisto en la urbo Pizo. Traktu do min kiel la honoran homon kaj redonu al mi mian edzinon.

Paganino: Estas ĉe mi belega virino, sed mi ne supozas ŝin via edzino. Sciu tamen, ke mi estimas similajn al vi homojn kaj mi povas plenumi vian deziron, prezentante al vi tiun damon. Se ŝi vere estas via edzino, vi povos trankvile preni ŝin al via hejmo.

Rikardo: Sinjoro, mi vidas ŝin, ĵus ŝi alvenas. Ŝi estas mia Bartolomea! Edzino mia! Ploreĝis mi dum multaj noktoj kaj tagoj, ne ekzistis limoj de mia sopiro. Sed, vere, multajn dankojn al la ĉielo...

Bartolomea: Paganino, kiu estas tiu ĉi homo kaj pri kio li parolas?

Paganino: Ja ĉi estas via edzo.

Bartolomea: Mi ne konas tiun ĉi maljunulon.

Rikardo: Ĉu eblas?! Bartolomea! Vi ne rekonas min?!

Bartolomea: Mi ne konas vin, sinjoro, kaj mi ĵuras, ke unuafoje mi vin vidas en mia vivo.

Rikardo: Ĉu vi rememoras la fiŝkaptadon, kiu tiom multe min kostis? Vin perdinte mi tiel doloris, ke vere neniu en la mondo sentis la samon. Vi min fakte ne rekonis, sed sciu, ke mi pagos multe por vin reaĉeti; ja mi devas preni vin, ĉar vi estas mia edzino.

Bartolomea: Sinjoro, vi vere rekonis min mise.

Rikardo: Rigardu vi min atente. Ja mi estas via Rikardo di Kinzika!

Bartolomea: Ĉu mi jam povas foriri, Paganino?

Rikardo: Sed mia edzino, Bartolomea! Vi estas mia edzino!

Bartolomea: Vana via babilaĉo, sinjoro. Mi vin ne konas kaj neniam mi vin renkontis.

Rikardo: Rememoru Pizon, rememoru nian hejmon.

Bartolomea: Neniam mi estis en Pizo, mia sinjoro. Permesu adiaŭi vin. /ŝi foriras/

Paganino: Mi nenion plu povas al vi fari, sinjoro Rikardo. Mi bedaŭras nur, ke vi la noblan korsaron suspektis pri la forkapto de via edzino.

Rikardo: Sed tio ja ne eblas, ŝi ja estis...

Paganino: Ŝi estis mia edzino. Kaj ŝi estas mia edzino. Adiaŭ kaj mi deziras al vi tutkore, ke vi retrovu vian amatinon... /li foriras/

Giovano: He, sinjoro Rikardo! Iu moktrompis vin tutcerte.

Rikardo: Fakte mi nenion povas de tio kompreni.

Giovano: Jen ĝi! Memoru Rikardo kaj vi, noblaj atestantoj de la teatraj okazintaĵoj, ke la amo ne konas la kalendaron. Ĝi vivas super la tempo, la spaco kaj la homa volo ankaŭ ofte. Tial ĝi estas belega, bona kaj homa.

/dirante jam al la publiko/

Do aŭskultinte kaj observinte la dek novelojn el la libro "La deka-
merono" prenitajn, kunprenu ilin en hejmojn viajn kaj en viajn vivojn
por averto kaj instrua. Ne prijuĝu min malbone, ke mi - povas esti -
ne bridis mian langon, ke mi rakontis maldecaĵojn - laŭ iuj, sed mi
faris tion por via profito. Kiam vi jam foriros el nia teatro en mal-
plena nokta urbo, konservu en via memoro majstron Giovanon kaj lian
Marian. Kaj liajn alegoriojn.

Balado pri forpasado

En nia torenteca viv'
ventoj nin nekonaten pelas
kaj sort' rikanas nin,
kviet restaĵojn ŝtelas.

Transiru landon de la ver'
ĉirkaŭvolvitaj per forgeso.
Ĉu Dion kreis la infer',
temp' venas de konfeso.

Refreno: Jam nigraj birdoj flugu foren,
sun' la ĉielon jam malŝlosu,
mi ne rapidas apriore
mondon marteli sur amboso.

Sed ne prirabos mond' la ĝojon,
la tempbelecon ne alŝirmos,
forgesi - jes, sed kontraŭ bojo
propran mi forton firmos.

La vivodormon el sufer'
naskis la reviviĝ-espero,
terura kapt' de l'ver'
nin genuigas teren.

Ĝistrinkos tamen vivon mi,
la klarobskurojn mi gustumos
kaj daŭros plu kantante ĝis
kiam la vivo ne plenumos.

Refreno: Jam nigraj birdoj flugu foren...